

Dragan Bunić « La monda federacio »

PREZENTO

(Prezento de la libro, kiu estos publikigita serblingve en 2016)

I. Antaŭparolo

II. Enkonduko

III. Enhavo

IV. La monda federacio

Ĉapitro I. LA IDEOJ PRI NECESO DE LA KUNLABORO INTER ŜTATOJ KAJ ILIAJ ORGANIZOJ

1. Ideoj de la antikva tempo ĝis la Unua Mondmilito

1.1 Ideoj en la antikva tempo

1.2 Ideoj en la tempo de absolutaj monarkioj

1.3 La kreado de la Nordamerika Unio

1.4 Ideo de Simon Bolivar

1.5 Ideo de Victor Hugo

1.6 Konkludo

2. Ideoj inter la du mondmilitoj

2.1 Ideo de Lav Trocki

2.2 Ideo de Aristid Brian

2.3 Ideoj de du britaj lordoj (Lotian kaj Curtis)

2.4 Ideo de Herbert George Wells

2.5 Ideo de Clarens Kirschman Straight

2.6 Konkludo

3. Ideoj post la Dua Mondmilito

3.1 Ideo de Winston Churchill

3.2 Ideo de Gary Davis

3.3 Konkludo

4. Ideoj komence de la 21-a jarcento

4.1 Propono de Jacques Atali

4.2 Invito al internacia solidareca kaj respondeca administrado

4.3 Propono de Hose Manuel Baroso

4.4 Propono de Dragan Bunić

4.5 Enrika Lete

4.6 Konkludo

5. Kontraŭstaroj al la kreado de unu monda ŝtato

Ĉapitro II. KRIZO DE LA MODERNAJ ŜTATOJ KAJ ILIAJ ORGANIZOJ

1. Malsukceso de la mondaj organizoj de ŝtatoj

1.1 Malsukceso de Ligo de Nacioj

1.2 Malsukceso de Organizo de Unuiĝintaj Nacioj (UN)

- 1.2.1 Organoj de Organizo de Unuiĝintaj Nacioj
- 1.2.2 Konsilio de Sekureco, organo de grandaj potencoj, venkintoj en la Dua Mondmilito
- 1.3 Konkludo
- 1.3.1 Nesufiĉa oficrajto de la Ĝenerala Asembleo de UN kaj ebleco de vetoo
- 1.3.2 Senprecizeco de malpermeso por akiri kaj alhavigi atomajn armilojn.
- 1.3.3 Ŝtata suvereneco

2 Malsukceso de Eŭropa Unio

- 2.1 Fondiĝo kaj evoluo
- 2.2 Leĝdonado
- 2.3 Justico
- 2.4 Lukto kontraŭ ekonomia krizo
- 2.5 Konkludo

3. Malsukceso de institucioj aktivaj en ekonomia kaj financa kampoj

- 3.1 Internacia Mona Fonduso
- 3.2 Monda Banko
- 3.3 Monda Komerca Organizo
- 3.4 Organizo por Ekonomia Kunlaboro kaj Evoluo (OEKE)
- 3.5 Grupoj de industrie evoluitaj ŝtatoj
- 3.6 Konkludo

Ĉapitro III. STRUKTURO DE ESTONTA MONDA ŜTATO

1. Konfederacio aŭ federacio?

- 1.1 Parlamento
- 1.2 Registaro kaj administracio
- 1.3 Federacia banko

2. Federaciaj ŝtatoj (membroj de Federacio de Unuiĝintaj Nacioj)

3. Regionaj organizoj de membroj de Federacio de Unuiĝintaj Nacioj

4. Lokaj aŭtoritatoj

5. Konkludo

Ĉapitro IV. SEKURECO

- 1. **Polico**
- 2. **Justico**
- 3. **Civila Protekto**
- 4. **Armeo**
- 5. **Konkludo**

Ĉapitro V. LEĜDONADO

- 1. **Leĝdonado ligita al diversspecaj krimoj**
- 2. **Leĝdonado ligita al ekonomio kaj aliaj kampoj**
- 3. **Konkludo**

Ĉapitro VI. EKONOMIO

- 1. **Aktualaj problemoj de la monda ekonomio**
- 2. **Banksistemo kaj Financoj**
- 3. **Multnaciaj kompanioj**
- 4. **Agrikulturo**
- 5. **Konkludo**

Ĉapitro VII. PROTEKTO DE NATURA MEDIO

Ĉapitro VIII. HOMAJ RAJTOJ

- 1 Unuiĝintaj Nacioj kaj la homaj rajtoj**
- 2 Regionaj konvencioj pri la homaj rajtoj**
- 3 Konkludo**

Ĉapitro IX. RELIGIOJ

- 1. Pri historio de religioj**
 - 1.1. Judaismo
 - 1.2. Kristanismo
 - 1.2.1 Divido de la kristana Eklezio je orienta (ortodoksa) kaj okcidenta (katolika)
 - 1.2.2 Apero de protestantismo
 - 1.2.3 Anglikanismo
 - 1.2.4 Aliaj kristanaj religoj
 - 1.3. Islamo
 - 1.4. Hinduismo
 - 1.5. Budismo
 - 1.6. Ĉinaj religoj
 - 1.7. Aliaj religoj
 - 1.7.1 Afrikaj tradiciaj aŭ indiĝenaj religoj
 - 1.7.2 Ŝintoismo
 - 1.7.3 Sikima religio (sikimismo)
 - 1.8. Ateistoj kaj nedeterminituloj
- 2. Konekso de religio kun la ŝtataj aŭtoritatoj**
- 3. Religia fanatikismo**
- 4. Konkludo**

Ĉapitro X. SOCIAJ ASEKUROJ

Ĉapitro XI. EDUKADO KAJ SCIENCO

- 1. Elementa edukado**
- 2. Meza edukado**
- 3. Alta edukado**
- 4. Scienco**
- 5. Konkludo**

ĈAPITRO XII. TRANSIRA PERIODO

V. Konkludoj

VI. Bibliografio

« *Nia vera ŝtateco estas la mondo* »

Herbert George Wells

Enkondukaj konsideroj

Ĝis la Unua Mondmilito la mondaj ŝtatoj kunlaboris diverskampe sed plej ofte okaze de militoj. En la jaro 1918, „fajrero de espero” lumigis la mondon. Post la Unua Mondmilito estis fondita Ligo de Nacioj, kiel la unua internacia organizaĵo de suverenaj ŝtatoj kun la celo sekurigi la

mondan pacon. Bedaŭrinde, tre rapide montriĝis ke tiu ĉi la unua monda ŝtatkomunumo ne kapablas plenumi tiun gravan taskon. Dum la tridekaj jaroj de la 20-a jarcento, kelkaj aŭtoroj, du anglaj lordoj Lotian kaj Curtis, kaj ankaŭ Wells kaj Staight, kritikis la Ligon, indikante ke ĝi, pro la suvereneco de la ŝtatoj kiu al ili permesas armigon kiel tute internan aferon, ne havas instrumentojn por malebligi agresemajn agojn de kelkaj ŝtatoj. Kiel solvon por eliri el tiu ĉi situacio, ili proponas novan organizadon de la ŝtatoj (Atlanta Ĉarto aŭ La Monda Federacia Ŝtato).

Malkapablo de Ligo de Nacioj sekurigi la mondan pacon, aparte malebligi la Duan Mondmiliton, motivigis ne nur la cititajn aŭtorojn serĉi aliajn solvojn, sed ankaŭ ŝtatojn-venkintojn de la Dua Mondmilito oferti al la mondo novan mondan organizaĵon de suverenaj ŝtatoj, Organizon de Unuiĝintaj Nacioj (UN), en kiu ili havas privilegiitan pozicion koncerne la decidpovon (Konsilio de Sekureco de Unuiĝintaj Nacioj). La militfino estis signita per „spektakloriĉa“ ĵeto de du atombomboj en Japanion, ne por devigi ĝin kapitulacii, sed por montri propran potencon al la tuta mondo.

Tiu ĉi nova „fajrero de espero“ naskita per la kreado de UN (1945), rapide senluziigis la modernan mondon suferintan dum la milito. La kreado de du militistaj blokoj, la monda divido je Oriento kaj Okcidento, militistaj intervenoj de tn. grandaj potencoj kaj tiuj de la militistaj blokoj kiujn ili gvidas, devigis la mondon serĉi aliajn elirojn el tiu ĉi stato. Kompreninte ke sub tiaj kondiĉoj UN ne povas realigi sian elementan mision – la gardadon de monda paco, Henry Davis postulis transformon de UN en unu mondan registaron. Ankaŭ unu el la konataj aktoroj de la Dua Mondmilito Winston Churchill, serĉis la solvon kadre de Eŭropa Federacio, kio klare montras malkonfidon al la novfondita monda organizo de suverenaj ŝtatoj (UN).

Vidinte kien gvidas la pozicio de la grandaj potencoj kadre de Unuiĝintaj Nacioj kaj la monda divido inter ili, 25 ŝtatoj kiuj ne apartenis al la militistaj blokoj de la Oriento kaj de la Okcidento, komence de la sesdekaj jaroj de la 20-a jarcento fondis Movadon de nealiancaj landoj, kies nombro rapide grandiĝis. Tiuj ĉi landoj havis certan sukceson en UN – la kreadon de tn. Grupo 77 kaj UNCTAD (Konferenco de Unuiĝintaj Nacioj por Komerco kaj Evoluo, kies celo estas integri landojn de la tergloba sudo en ekonomiajn procezojn de evoluitaj landoj), sed la internacia situacio ne pliboniĝis. Riĉiĝo de evoluitaj kontraŭ malriĉiĝo de neevoluitaj landoj daŭras, militistaj intervenoj de la grandaj potencoj ne ĉesas, kaj Konsilio de Sekureco de Unuiĝintaj Nacioj restas blokita per vetoj de siaj permanentaj membroj.

Dum la dua duono de la 20-a jarcento, ne aperas ideoj pri la kreado de unu monda ŝtato. Tiun ĉi fakton oni povas klarigi per rezigno kaj senluziigo de tiuj kiuj perdis esperon pri pliboniĝo de la stato, au per espero ke Organizo de Unuiĝintaj Nacioj tamen povas helpi por ŝanĝi la internacian situacion.

Motivo por ioma optimismo estis la falo de la Berlina muro (1989), kio simbolis finon de la Malvarma Milito kaj ĉeson de konfliktoj inter la Oriento kaj la Okcidento, sed fakte ĉio ĉi restis kiel antaŭe. Konduto de la grandaj potencoj ne ŝanĝiĝas, la armiga konkuro daŭras plu, nia planedo malpuriĝas krizgrade, la naturo komencis reagi per tertremoj, uraganoj kaj cunamoj.

Anstataŭ krei pli bonan mondon kiu danke al la globaliĝa ekonomio malfermiĝis kiel neniam antaŭe, aperis novaj ĝis nun nekonataj problemoj. Montriĝis ke ŝtatoj, eĉ tiuj superpotencaj, ne plu regas la mondon, ili eĉ ĉiam pli perdas la gvidan pozicion kiun nun akiris grandaj bankoj kaj aliaj financaj institucioj kaj multnaciaj kompanioj. Enkadre de la globaliĝo, la ekonomiaj rilatoj intensiĝas, sed oni sentas mankon de unu centra aŭtoritato kiu per siaj leĝoj ordigus la sovaĝintajn merkatojn kie neniam moralaj reguloj estas respektataj.

Aperas ĝis nun neimageblaj financaj spekulacioj, la elpensado de novaj financaj „produktoj“ kaj „konstrukcioj“ kiuj al kelkaj grandaj bankoj, financaj institucioj kaj multnaciaj kompanioj provizas kolosajn profitojn, kaj kiuj kaŭzas bankroton de iliaj konkurantoj, monperdon de multaj ŝparuloj kaj eĉ loĝejajn perdojn de multaj familioj. La financa damaĝo kiel ĉiam estas kompensata de impostpagantoj kiuj neniel influis la aferon. Tiaj ĉi kondutoj kaŭzis la aperon de nova Monda ekonomia krizo (2007) kiun multaj opinias pli serioza ol tiu kiu skuis la mondon en la jaro 1929.

Grupo 20 (deknaŭ evoluitaj landoj kaj Eŭropa Unio) klopodas trovi eliron el la krizo pere de la (fi)fama trio (IMF- Internacia Mona Fonduso, Monda Banko kaj Organizo por Ekonomia Kunlaboro kaj Evoluo), sed sen sukceso: „la spirito estas liberigita el la botelo“ kaj ne povas en ĝin reveni! Interŝtataj interesoj, kiuj en certaj landoj kongruas kun la interesoj de la grandaj bankoj kaj multnaciaj kompanioj - kies iamaj altskalaj dungitoj nun servas al ties registaroj kiel konsilantoj aŭ ministroj - tiom diferencas ke ne eblas trovi la solvon taŭgan por ĉiuj. Publikaj ŝuldoj (ŝuldoj de suverenaj ŝtatoj) supermezure kreskas, kaj plimulto da registaroj senhezite subtenas la grandajn bankojn kaj la naciajn kompaniojn kies malprofitojn devas pagi civitanoj, la impostpagantoj. Apud ĉio ĉi, la ŝtata suvereneco restas netuŝita.

La menciita situacio postulas aperon de novaj iniciatoj kiuj serĉas la kreadon de unu monda ŝtato au radikan ŝanĝon de UN: la ideojn ofertas Jacques Atali (2009), Jose Manuel Baroso kaj Grupo de eŭropaj intelektuloj kaj ŝtatestroj kaj ankaŭ la aŭtoro de ĉi tiu teksto (2012). La aŭtoroj de la iniciatoj interkonsentas pri tio ke la eventoj okazintaj dum la 20-a kaj komence de la 21-a jarcento montris ke oni ne plu povas daurigi la aferojn kiel ĝis nun, ke por la savo de nia planedo oni devas entrepreni pli radikajn paŝojn kiuj iras en la direkton de gravaj ŝanĝoj de UN ĝis la kreado de ununura eŭropa aŭ monda ŝtato. Tamen, neniu inter ili plideteligas sian iniciaton por montri kiamaniere la ideo povus esti realigita. Tio ĉi estis aldonata momento kiu motivigis min montri la manieron por fondi unu mondan federacion en kiu nunaj ŝtatoj abdikos de siaj suverenecoj je intereso de la monda federacio.

En la libro mi kritikis nek unu registaron, nek unu popolon, nek unu religion, kuturon aŭ speciojn de ajna parto de la mondo. Mi mencias nur historiajn eventojn al ĉiuj konatajn, kaj opiniojn de diversaj aŭtoroj pri la problemoj laŭ mia propra analizo. Oni ne forgesu ke diversaj politikaj reĝimoj pasas sed popoloj postrestas, kaj nur la popoloj finfine decidis pri siaj destinoj en diversaj landoj.

Mi esperas ke pri la okazintaĵoj preparolos la historiistoj, kaj mi atendas ke ĉiu civitano de nia planedo malgraŭ ŝtato, religio, politika partio aŭ aŭtoritato al kiu li apartenas, aliĝos por krei unu mondan ŝtaton en kiu regos paco, egaleco, respekto kaj toleremo.

La ideo verki ĉi tiun libron venis al mia kapo dum mi kolektis materialojn por mia libro *La justice pénale internationale*, (*La internacia porpuna juro*) publikigita en 2003, kaj *Criminalistique économique*, (*Kriminala ekonomio*) publikigita en 2010, sed aparte post la publikigo de artikolo en la franca *Un Etat pour tous les citoyens du monde* (*Unu ŝtato por ĉiuj civitanoj de la mondo*) en retejo <http://www.dragan-bunic.com/2012/12/un-etat-pour-tous-les-citoyens-du-monde/>, kaj en la serba lingvo *Jedna država za sve građane sveta*, en retejo <http://kulturniheroj.com/?p=570>), en la jaro 2011.

Ankoraŭ dum mia laboro en la doktoriĝa tezo „Korupto kiel formo de socie danĝera konduto“ finita en 1990, mi malkovris ke multaj internaciaj problemoj (pacgardado, lukto kontraŭ malsato, malriĉeco kaj krimoj, problemoj de elmigradoj, protektado de naturo...) ne povas esti solvitaj enkadre de Organizo de Unuiĝintaj Nacioj (UN), kiu iĝis neefika per siaj proklamoj de pluraj rezolucioj kaj per superproduktado de juraj normoj (akceptado de miloj da juraj dokumentoj kiuj ofte estas konfliktaj inter si mem, kaj kiujn la membroŝtatoj simple ne respektas, aŭ estas malebligataj en siaj agoj pro la vetooj de grandaj potencoj, membroj de la Konsilio de Sekureco de UN).

La ĉefa motivo por la daŭrigo de mia laboro jam komencita en la citita artikolo „Jedna država za sve građane sveta“ („Unu ŝtato por ĉiuj civitanoj de la mondo“), estas la reagoj de miaj legantoj. Rete aŭ en personaj kontaktoj ili stimulis min daŭrigi la laboron kaj publikigi libron pri tiu ĉi interesa temo. Iliaj instigoj kaj kuraĝigoj blovis la venton en miajn kreivajn velojn, sed starigis min antaŭ seriozaj dilemoj: ĉu mi estas kapabla, kvalifikita, por komenci tiel seriozan verkon por kiu oni bezonas multdisciplinan teamon ne nur de juristoj, sed ankaŭ de ekonomikistoj, politikologoj, sociologoj, fakuloj por banksistemo kaj aliaj. Kian verkostilon elekti? Se mi volas ke la libro estu atingebla al la pli vasta legantaro sendepende de ilia edukado, mi devis eviti, tiel eble plej multe, la komplikajn lingvaĵojn, la juristan stilon kaj longegajn citaĵojn.

La solvon indikis al mi Paul Krugman, kiu en sia verko *Pourquoi les crises reviennent toujours*, (*Kial la krizoj revenas ĉiam*) publikigita en la jaro 2009, diras: „kiel ĉiu ekonomikisto mi kapablas verki tiel ke neniu min komprenu [...], sed la mondo havas bezonon esti informita, kaj se tio povus esti ebla, miaj ideoj devas esti prezentitaj en la maniero ke ili estu akcepteblaj por ĉiuj, ne nur por doktoroj pri ekonomiko.“ (Krugman 2009, p. 10-11). Mi do decidis prezenti miajn ideojn kiel eble plej simple, sed ankaŭ doni la okazon al tiuj kiuj estas pli kvalifikitaj ol mi, daŭrigi laboron koncerne tiun ĉi seriozan temon; tial mi malonge citis la aŭtorojn kiujn mi enmetis en la bibliografion. Mallongajn citaĵojn ligitajn al retejoj, komentojn kaj rimarkojn (piednotojn) mi publikigis malsupre ĉe la fino de la paĝo.

Mi konscias pri tio ke dum la vojo al la kreado de unu monda ŝtato, oni renkontos gravajn rezistojn precipe de tiuj kiuj ne estas pretaj abdiki de siaj privilegioj kaj potencoj. La rezistojn oni povas superi per forto de argumentoj per kiuj eblas klarigi la avantaĝojn de la kreado de unu monda ŝtato samkiel la fakton kiun plimulto da civitanoj de nia planedo jam konas – la mondo devas ŝanĝiĝi por ne esti detruita.

Mi finos ĉi tiun parton de la teksto per vortoj de Henry Dunant, fondinto de la Ruĝa Kruco kaj la unua porpaca Nobelpremiito, kiu diris: “Kiu estas sufiĉe frenezaj pensante ke ili povas ŝanĝi la mondon – tiuj sukcesos!” Estu ni do sufiĉe frenezaj kiel Dunant, kiu multe faris por la mondo; frenezaj kiel tiuj kiuj proponis la kreadon de unu monda ŝtato por ĉiuj civitanoj de nia planedo, kaj ni agu en landoj en kiuj ni vivas, kuraĝe, trankvile kaj per argumentoj, por realigi la ideon. Ni ne forgesu la fakton ke ĉiu ŝtato konsistas el popolo, el civitanoj, fizikaj personoj kiuj estas forgesitaj kadre de internacia vivo, sed kies forto estas nemezurebla kaj sufiĉa por ke niaj deziroj realiĝu, ne nur en niaj landoj sed en la mondo. En majo 2014, juna ĵurnalisto Vincent Kostet (RTN Neuchâtel, Svislando) demandis min ĉu mia ideo, lanĉita niatempe, estas „pli utopia“ ol tiuj iniciatitaj antaŭ mi (Wells, Straight, Davis, kaj aliaj). Mi respondis ke hodiaŭ ni estas pli proksimaj al la realiĝo de tiu ĉi ideo ol iam antaŭe. Ĉar hodiaŭ danke al la teknologia progreso kaj al la sama progreso de nia konscio ni scias ke la ŝtataj suverenecoj estas unu el la plej gravaj kulpoj pro niaj dividoj, pro niaj konfliktoj; sed se ni montros solidarecon, ni estos „sufiĉe frenezaj“ por finsukcesi.

Fine, per tiu ĉi libro mi donas al la legantoj “nekuiritan manĝaĵon” kiun oni povas “daŭre kuiri” ĝis la finkuirado (la kreo de unu monda ŝtato). Se ĉiu el ni faros nur unu paŝon tiudirekten, ni faros multon. Per ĉi tiu teksto mi faras la ekpaŝon al tiu vojo. Vi uzu viajn sociajn retojn (Fejsbuko, Tvitujo, Interreto...) por propagi la ideon pri neceso krei la mondan ŝtaton. Pioniroj de la ideoj kaj multnombraj civitanoj kiuj tiun ideon subtenas, atendas instrukciojn kaj estas pretaj reagi. Ni faru kion Nelson Mandela mesaĝis: “Ni interplektu la manojn kaj ni ekpaŝu antaŭen, al la kreado de socio bazita je amikeco, humaneco kaj toleremo” (Mandela, 2011., p. 79), al la kreo de unu monda ŝtato kiu kvazaŭ patr(in)o estus bona por siaj gefiloj, senkonsidere la rason, religion, lingvon parolatan kaj lokon kie ili vivas.

KONKLUDO

(La romiaj numeroj signas libroĉapitrojn)

I

Se rapide ne konstituiĝos unu internacia kaj efika registaro, estonteco de la homaro estos malhela kaj malsekura.

Winston Churchill

Oni ne forgesu ke ĉiu raso kaj aparte ĉiu popolo havas sian propran historion kaj immanentajn karakterizojn. Hodiaŭ ni scias ke tiuj rasoj kaj popoloj migradis, ŝanĝis klimatojn kaj kontinentojn serĉante fekundan teron, pli favorajn veter- kaj vivkondiĉojn. El tiaj kontaktoj naskiĝas novaj rasoj, popoloj, ŝtatoj, lingvoj, kulturoj kaj multaj aliaj atributoj. Hodiaŭ homaj rasoj, popoloj, kontinentoj, lingvoj, kulturoj kaj aliaj homaj karakterizoj miksiĝas kaj alproksimiĝas. Interreto ebligas al ni ekscion de multaj gravaj aferoj en diversaj partoj de la vivo (informado, historio, religio, edukado, scienca esplorado, ekonomio, kulturo...). La sociaj retoj (Fejsbuko, Tvitujo, kaj aliaj) ebligas al homoj el diversaj landoj, regionoj kaj kontinentoj komuniki, interŝanĝi informojn, opiniojn, spertojn... Agrable estas vidi ke junaj homoj eĉ en la neevoluitaj landoj posedas

poŝtelefonojn, etkomputilojn... per kiuj ili povas komuniki de unu mondoparto al la alia. Ĉio ĉi faras nin pli proksimaj ol iam antaŭe dum la homa historio. Tio nin konvinkas ke la homaro estas kvazaŭ unu korpo, ke la homaj rasoj estas ĝiaj partoj (organoj), kaj ke sen bona kono de ĉiuj organoj oni ne povas ekkoni la korpon. Jen la motivo por unuiĝi je unu korpo (la monda federacia ŝtato) por ke la korpo povu bone funkcii.

En la mondo en kiu ni vivas, multnombraj generacioj kreis fizikajn kaj mensajn produktojn por pli bona vivo de ni ĉiuj. Oni ekzemple memorigu legantojn pri diversaj malkovroj en la antikva Ĉinio, Hindio, Mezopotamio, antikva Grekujo, Romio, en iama Bagdada Kalifato; same pri la jarcentoj de Renesanco, kie kreiĝis konstruaĵoj kiujn nuntempaj generacioj nek per la moderna tekniko povas krei, kaj fine ankaŭ oni menciuj la filozofiajn ideojn pri la homa egaleco... Niaj generacioj (20-a kaj 21-a jarcento) detruis aŭ kreis potencojn por la detruado de ĉio kion la antaŭaj generacioj dum jarcentoj kreadis (tiuj potencoj estas ekz. atoma kaj kemi-biologia armiloj, nukleaj provoj, enorma malpurigado de naturo kaj homa medio kaj breĉigo de la ozona kovrilo). La kapablo por la detruado estas grandega, sufiĉa por komplete detru la vivon sur la Tero. Sed paradokse, unuflanke ĝuste dum la 20-a kaj en la komenco de la 21-a jarcento ni multe klopodis realigi rajtojn kaj egalecojn por ĉiuj homoj, kaj aliflanke, kiel neniam antaŭe ni detruis la homajn vivojn kaj iliajn materiajn kaj spiritajn atingiĝojn (la du Mondmilitoj, kaj multaj regionaj kaj lokaj militoj), kaj ĉion ĉi je la nomo de la homaj libero kaj egaleco. Ĉu ne paradokse? Ĉu ne venis tempo ke niaj generacioj entreprenu iniciaton por superi la nunan staton?

En la nova monda ŝtato la historion ne verkos venkintoj sed objektivaj fakuloj, kaj tio ĉi ebligas al ĉiuj ekscii kio vere okazis en la pasinteco sen mallaŭdo de tio kio okazis, kaj tiamaniere estos malebligataj ajnaj spekulacioj kaj kulpigoj de aliuloj. Ni ne forgesos la pasintecon sed ni pli okupiĝos pri la estonteco kaj pri la kreado de pli bona vivo por ĉiuj.

II

*„Nin ankoraŭ povas savi nur tiuj kiuj opinias ke la sola patrolando
kiu meritas esti defendata, estas patrolando tuthoma“*
Bernard Clavel

La nuntempaj suverenaj ŝtatoj troviĝas en profunda krizo. Ili interkonkuras en ekonomia plano, praktikas nelojalan konkurencon unu kontraŭ alia, ekspluatas riĉecon de aliaj, precipe de malgrandaj ekonomie neevoluitaj kaj militiste malfortaj landoj, kelkaj eĉ militiste intervenas sub diversaj pretekstoj kiel ekzemple “protekto de la homaj rajtoj”, “protekto de amikaj ŝtatoj”, kaj altrudas siajn ideojn kaj sian politikan sistemon al aliaj ŝtatoj, ktp.

Organizo de Unuiĝintaj Nacioj (UN) ne estas kapabla solvi konfliktojn inter diversaj ŝtatoj samkiel aliajn mondajn problemojn. Kelkaj ŝtatoj provas grupiĝi al aliaj organizaĵoj kaj tiel solvi tion kio ne sukcesas solvi UN, (Eŭropa Unio, NATO pakto, Movado de Nealiancaj Landoj, kaj aliaj), sed ankau ili ne havas pli da sukceso ol UN.

La nova monda ŝtato, en kiu iun tagon troviĝos ĉiuj nunaj ŝtatoj (grandaj kaj malgrandaj) al kiuj ĝi ebligos difinitajn aŭtonomecojn kondiĉe ke ili respektu la federaciajn konstitucion kaj leĝojn, estos utila por ĉiuj civitanoj de nia planedo. En ĝi homoj ne mortos pro malsato, ĉiu lando (nuntempaj sendependaj ŝtatoj) havos eblecon ekonomie evolui, la migrado de homoj estos minimuma ĉar ili trovos laboron en sia lando (en kiu ne plu estos diktaturoj, malrespekto de la homaj rajtoj, ekspluatadoj...) en kiu ili povos kontentigi siajn sociajn, kulturajn kaj aliajn bezonojn.

La ŝtata suvereneco estis granda obstaklo por efika funkciado de Ligo de Nacioj, nuntempe ĝi same estas obstaklo por UN, Eŭropa Unio, kaj aliaj grupiĝoj de ŝtatoj. Tutklariĝis ke nur per abdiko de la suvereneco favore al unu monda federacia ŝtato, la mondo povas lukti kontraŭ multaj akumilitaj problemoj de nia planedo. La civitanoj estas tute neglektitaj en la internacia juro kiu estas monopoligita fare de la suverenaj ŝtatoj.

III

*„Monda federacio estas grava tasko por la estonteco,
kiu malfermas plej pozitivan perspektivon“*

Willy Brandt

Ne estas destinite por unu sola homo establi unu sistemon de estonta monda ŝtato, sed al li ne estas malpermesate pripensi kaj proponi ĝin. J. Stiglic asertas ke la nuntempaj politikaj sistemoj estas en krizo, ili estas malstabilaj kaj “predikantoj” kiuj al sia popolo promesas pli bonan vivon, fakte perfidas popolamasojn (Stiglitz, 2014, p.37). Ŝanĝoj do estas nepraj. Kompreneble ke civitanoj, inter kiuj ekzistas pli fakaj homoj ol mi, trovos pli taŭgan solvon ol mi, sed ilin oni devas instigi kaj orientigi. Oni devas scii ke kvankam la volo de la popolo estas esenca por la kreado de nova monda federacia ŝtato, kiu povas havi nomon Unuiĝintaj Nacioj aŭ aliel, ĝi ne estos sufiĉa per si mem; oni tamen havos bezonon por la aktivado kaj konsiloj de plej diversaj fakuloj, internaciaj organizoj (neregistaraj kaj registaraj) al kiu tiu ideo estas en la koro.

Tiu estonta monda ŝtato, kiel ĉiu klasika ŝtato, havos leĝodonan, ekzekutivan kaj juran funkciojn kaj ankaŭ plurajn instituciojn kiuj helpas plenumi ilin. Ŝtatoj, membroj de la monda ŝtato, estos reprezentitaj per la sama nombro de la reprezentantoj en Parlamento. Principo “unu ŝtato – unu voĉo” estos karakterizo de ĝia demokrateco.

La rolo de la nunaj ŝtatoj estis ĝis nun negita en kampo de ekonomio, kaj novliberaluloj volis ĝin tute neglekti. Sed, la aktuala ekonomia krizo (2007) klare montris ke tiu ĉi rolo antaŭ si havas ankoraŭ longan vivon, ĉar ĝi estas grava por ekonomio, edukado, sekureco, ekologio kaj pri multnombraj aliaj aspektoj de la socia vivo. Oni vidis ke malbona leĝdonado kaŭzas sociajn disdividojn, rompas principojn de egalaj ŝancoj en la merkato, kaj neekzisto aŭ forigo de leĝoj en iuj kampoj (malregulado) gvidas en ĥaoson, en krizojn, ekspluatadojn kaj havas ankaŭ aliajn konsekvencojn.

La rolo de nova monda komunumo unuavice estos la „elimino“ de momenta ĥaoso kiu regas en la kampoj de politiko kaj ekonomio. Estos establita ordo en financaj kaj aliaj merkatoj, estos

malpermesataj spekulacioj, precipe tiuj kiuj koncernas nutrajn produktojn, medikamentojn kaj aliajn produktojn gravajn por homoj; oni malpermesos al firmaoj, bankoj kaj aliaj institucioj la financadon de politikaj kampanjoj en ĉiuj membroŝtatoj kaj estos ebligita „la egaleco de ŝancoj“, egalrajtoj de juraj kaj fizikaj personoj en ĉiuj kampoj.

IV

„En mia menso ne estas ajna dubo pri tio ke unu internacia registaro devas alveni, alikaze, la mondo iros al memmortigo”

Pandit Nehru

Estas videble ke koncerne la sekurecon, la nuntempaj suverenaj ŝtatoj ne kapablas provizi la pacon en la mondo; certaj kondutoj de kelkaj inter ili prezentas minacon al la monda paco. Ĝis nun, laŭkutime, kiam granda potenca ŝtato havas internajn problemojn (senlaboreco, ribeloj, malbonaj ekonomiaj rezultoj), ĝi turniĝas ekstere, solvante, precipe perforte, problemojn de ŝtatoj kiuj estas „danĝeraj por ĝiaj interesoj“, „danĝeraj por la mondopaco“, ke tiuj ŝtatoj „malrespektas homajn rajtojn“, aŭ estas „terorismaj“, ktp. Tio ĉi eble aspektas preskaŭ nekredeble, sed bedaŭrinde tio estas nia realo. UN ne malebligas tiaĵojn, kaj dum la debato pri tia ĉi konduto kiun la tuta mondo taksas krima, la tiudirektan rezolucion de la Konsilio de sekureco oni simple malebligas per vetoo. Tiaj kondutoj povas esti malebligataj nur per la kreado de unu monda federacio de egalrajtaj membroj (landoj) kiuj negos proprajn suvernecojn favore al la federacia ŝtato.

La nova monda ŝtato havos armeon, policon kaj civilan protekton. Tiuj organoj ekzistos je la federacia nivelo, samkiel je la nivelo de la ŝtatoj, membroj de la monda federacio, kies forto, grandeco kaj uzo estos regulitaj per la federacia konstitucio kaj federacia leĝoj, sed ankaŭ per la leĝoj de membroŝtatoj kiuj estos en akordo kun la federaciaj.

Por sia funkciado tiuj tri fortoj intime kunlaboros. La armeo rilate al la ĝisnunaj potencoj de la suverenaj ŝtatoj, membroj de UN, estos malgrandigita je la nivelo de reala neceso, kaj la armiloj por la amasa detruado tute eliminitaj. La armeo estos uzata por batalo kontraŭ terorismo, danĝeraj formoj de organizitaj krimgrupoj kaj por interveno okaze de naturaj katastrofoj kiel ekzemple estas tertremoj, incendioj, inundoj grandskalaj, kontaĝaj malsanoj kaj en aliaj, leĝe antaŭviditaj kazoj. La polico de tiu ĉi estonta monda ŝtato jam havas sian kernon: Interpol. Tiu ĉi internacia polica organizaĵo povus esti transformita en federacian policon kiu estos kapabla batali kontraŭ plej ekstremaj formoj de krimaj agoj, ĝi kunlaboros kun policoj de la membroŝtatoj kaj estos uzata por aliaj porpreventaj kaj subpremaj aktivadoj strikte leĝe difinitaj. La civila protekto estas signifoplena servo dummilite kaj dumpace. Ĝis nun ĝi tute pravigis sian ekziston en la plejmulto da suverenaj ŝtatoj en la mondo. Konforme al tio, la estonta monda ŝtato devus konsistigi ankaŭ la civilan protekton; ĝi estos unu el la pilieroj de la mondŝtata sekureco.

La monda ŝtato konsistigos ankaŭ sciencajn instituciojn kiuj esploros faktorojn kaŭzantajn krimojn, pacrompon kaj aliajn negativajn aferojn, kaj proponos iliajn forigojn. Ĉar la ordo, paco kaj sekureco de la civitanoj estas komuna intereso de ĉiuj, la forigo de tiuj faktoroj estas nepre

tasko de la federacia monda ŝtato, de la membroŝtatoj de la federacio, kaj de multnombraj aliaj institucioj, laŭ speciale aprobita plano fare de la federacia ŝtato kaj sub ĝia gvido.

V

*“Ke unu monda leĝo superu la naciajn registarojn
la nura solvo estas krei parlamenton post la mondaj balotoj
en kiuj voĉdonos ĉiuj mondaj popoloj”*

Albert Camus

Koncerne la leĝdonadon en la mondo de la suverenaj ŝtatoj kaj iliaj integraĵoj (UN kaj aliaj), situacio estas paradoksa. Unuflanke ekzistas amaso de reguloj (superproduktado) kiuj ripetiĝas, ofte eĉ ekskludiĝas kaj ignoras rezoluciojn de UN, internaciajn konvenciojn, kaj aliflanke certaj kampoj entute ne estas regulitaj aŭ estas regulitaj neadekvate (financa merkato, interreto, kibernetikaj krimoj, ekonomiaj krimoj).

Superproduktado de la juraj normoj hodiaŭ regantaj en UN kaj en aliaj integraĵoj de la suverenaj naciaj ŝtatoj, malaperos. La monda ŝtato transprenos plej bonajn normojn el la ekzistantaj juraj reguloj, sed ilia nombro devus esti malgrandigita laŭ la necesa grado, kaj la monda ŝtato klopodos ke ili estu pli klaraj kaj pli uzeblaj en la praktiko. La leĝoj devas esti klaraj kaj klare speguligi la celon (ekzemple la elimino de korupto, protektoj de infanoj, junuloj, laboristoj, malsanuloj kaj olduloj, socia helpo, lojala konkuro...). Ĝi ankaŭ reguligos multajn ekonomiajn, sociajn kaj aliajn rilatojn kiuj ĝis nun ne estis regulitaj, aŭ estis neprecize regulitaj. Bonaj reguloj estas fundamento por la egaleco de la civitanoj, firmaoj kaj aliaj institucioj. Ili estas gravaj por diversaj interrilatoj de la civitanoj (edukado, laboro, pensioj, heredaĵoj...), ekonomio (agrikulturo, fondiĝo, aktivado kaj likvidado de la firmaoj, bankoj kaj aliaj institucioj...), politiko (elekto-maniero por diversaj ŝtataj funkcioj, malpermeso al la ekonomiaj subjektoj finance subteni kandidatojn...) kaj multaj aliaj.

Obeo al la reguloj (leĝoj kaj aliaj juraj dokumentoj proklamitaj de la ŝtataj organoj) estos la ĉefa regulo de la nova monda ŝtato. Ĝi ebligos rapidan kaj efikan proceduron de akcepto de novaj kaj ŝanĝo de ekzistantaj leĝoj kiuj montriĝis netaŭgaj aŭ neefikaj por la regado de certaj soci-ekonomiaj agokampoj. Diversaj institucioj kaj civitanoj havos la rajton iniciati la akceptojn aŭ ŝanĝojn de la leĝoj kaj de aliaj reguloj.

VI

*“Se ni volas, ni povas venki malriĉecon
kaj malsaton en ĉiuj landoj en la mondo”*

Joseph Stiglitz

Momente, la monda ekonomio suferas multajn malsanojn (malegaleco, korupto, ekspluato, violento, nesufiĉa au neekzistanta mondskala regularo en bankaj kaj financaj kampoj, tiuj pri la aktivado de multnaciaj kompanioj, pri disdivido de subvencioj...). En kelkaj suverenaj ŝtatoj, eĉ en evoluitaj, la situacio estas zorgoplena. J. Stiglitz donas ekzemplon el Usono kie en la 2008 jaro donacita socia helpo al unu kompanio (150 miliardoj da dolaroj) superas la socian helpon donacitan al malriĉaj civitanoj de la lando en la periodo de 1990 ĝis 2006 (Stiglitz, 2014, p. 256). Rigoraj kriterioj altruditaj al suverenaj ŝtatoj trafitaj per la krizo ne donas la deziratajn rezultojn... La konsekvencoj de tio estas malsato, malsanoj, morto de milionoj da loĝantoj de nia planedo, plua riĉiĝo de riĉuloj kaj malriĉiĝo de malriĉuloj kaj enormaj soci-ekonomiaj neegalecoj.

Se ĉiuj nuntempaj ŝtatoj ariĝos je unu monda federacio, oni povos detruo la nukleajn armilojn kaj armilojn por la amasa detruo, nuligi plurajn diplomatajn reprezentantojn de la nuntempaj ŝtatoj, malgrandigi la armeon konforme al la minimuma neceso kaj realigi reformojn kiuj ebligas tiel ŝparitan monon uzi por la ekonomia evoluo, precipe por rapida evoluo de neevoluitaj landoj kaj regionoj, ekzemple por irigacioj en Afriko, Azio kaj aliaj regionoj kiuj estas senakvaj kaj en kiuj regas malriĉeco, malsato, malsanoj kaj aliaj malbonaĵoj. Se hodiaŭ oni povas alkonduki nafton kaj gason al distanco de preskaŭ dek mil kilometroj, kial oni tion ne povas fari kun la trinkanta akvo kaj akvo por traakvado de kampoj kiuj povus nutri loĝantaron de tiuj regionoj kaj provizi diversajn agrikulturajn produktojn por merkato. En tiuj ĉi kondiĉoj, tiuj regionoj danke al la klimato, povus havi du aŭ eĉ tri rikolotojn jare. Tio ĉi ebligas al homoj trovi laboron en sia lando kaj vivi pli bone, samtempe plifortigos ekonomion, malgrandigos la senlaborecon kaj estos en la plej bona intereso de ĉiuj mond-civitanoj. Ĉio ĉi kontribuos al la ekonomia egaleco de la mondaj regionoj, altigos la aĉetpovon de la loĝantaro, malgrandigos popolajn migrojn kaj havos aliajn pozitivajn konsekvencojn.

En la monda ŝtato ne plu ekzistos „publikaj ŝuldoj“ (ŝtataj ŝuldoj); tiuj kiuj ekzistas inter nunaj sendependaj ŝtatoj estos regulitaj je la nivelo de la monda federacia ŝtato, por eviti bojkoton de ŝuldigitaj ŝtatoj. La nova monda ŝtato, tutkonscia ke tiuj ŝuldoj rezultiĝis el la agoj de kelkaj kompanioj, bankoj kaj aliaj institucioj kiuj en akordo kun la registaroj de la nuntempaj suverenaj ŝtatoj per diversaj koruptaj agoj kaj spekulacioj, kontribuis al la ŝulda alteco de pluraj landoj, kreos unu fonduson por regulado de tiu ĉi problemo (diskutoj, reaĉeto de ŝuldoj, dekalkulo de ŝuldoj, ilia enpago en difinita limdato...). Se la esplorrezulto de ties fonduso montros ke la ŝuldoj estas rezultoj de neadekvata, eksterleĝa konduto de tiuj ŝtatoj, bankoj, multnaciaj kompanioj kaj aliaj institucioj, ili devos esti dekalkulitaj.

VII

*„Nur tiu kiu estas sufiĉe pesimisma por kompreni la grandecon de danĝero,
havas eblecon partopreni en ĝia forigo“*
Wilhelm Röpke

Protekto de naturo kaj de vivmedio havas kernan signifon por vivoj de homoj, plantoj kaj bestoj sur nia planedo. Momente ĝi estas neglektita je tiu grado ke minacas al la homoj kaj iliaj medioj, al la monda ekonomio kaj al pluraj aliaj homaj aktivecoj. Malpurigadoj estas tiom amasaj kaj danĝeraj ke oni definitive devas ion entrepreni por savi nian planedon kaj niajn vivojn. Pluraj organizoj, plejofte multnaciaj kompanioj, faras enormajn damaĝojn al la vivmedio kaj pro tio ili pagas simbolajn punojn. Rememoru ni nur naftan elverŝon de milionoj da litroj en la Atlantan oceanon ĉe la Meksika golfo fare de firmao BP en la jaro 2010! Apude, tiaj ĉi kompanioj uzas monon por influi al la ŝtataj organoj okupiĝantaj pri la leĝdonado por protekto de la vivmedio. (Stiglitz 2014, p. 156)

La naturo komencis atentigi nin (pluraj naturaj katastrofoj, tertremoj, uraganoj, cunamoj) kaj se ni deziras savi la planedon, nia generacio devas fari ion tiudirekte. Se ni ne vekigis ĝustatempe, ni riskas tute ne vekigi kaj tiam malaperos ĉio kio nun troviĝas sur la tergloba (homoj, plantoj, bestoj). Se ekzistas volo, kaj ĝi certe ekzistas inter la loĝantoj de nia planedo, tiam ekzistas la solvo. Oni nur devas tiun volon direkti al la ĝusta celo. Ni esperu ke la hodiaŭaj komunikiloj tion ebligas.

La nova monda ŝtato dediĉos apartan atenton al la protektado de la vivmedio. Ĝi donos regulojn kiuj stimulos ties protekton kaj akre sankcios la naturan malpurigadon, antaŭvidante punojn kiuj malpermesos pluan aktivadon de kompanioj kiuj ne obeas al la naturprotektaj reguloj. La monda ŝtato ankaŭ planos preventon kiel konstantan procezon de senlimigita daŭro, kaj garantios ĝian realigon.

VIII

*La Okcidento prezentas al aliaj «la okcidentan koncepton de demokratio »;
Tiu eraro ekestis pro la neglekto de intelekta historio de aliaj socioj
Amartya Sen*

Malgrau tio ke ekzistas la «Universala deklaro pri la homaj rajtoj», akceptita fare de UN en la jaro 1948, la homajn rajtojn oni lezas, kio signifas ke la «universaleco» restis nur surpapera. Kampo de la homaj rajtoj estas tre grava por la nova monda ŝtato. La nuntempaj suverenaj ŝtatoj forgesis ke la obeon al la homaj rajtoj oni ne povas atingi per ununura dekreto, kvankam ĝi estas proklamita fare de UN kaj nomita «Universala deklaro pri la homaj rajtoj».

Temas pri specifa fenomeno, tre larĝa kampo, kiu povas sukcese funkcii nur per respekto de leĝoj, de homaj diferencoj kaj specifoj de iliaj kulturaj, lingvaj, religiaj kaj aliaj karakterizoj. Hodiaŭ ni havas paradoksan situacion. Suverenaj landoj kiuj vundas la homajn rajtojn ĉu ene de si, ĉu ie ekstere en la mondo, donas lecionojn al aliaj landoj pri la obeo de la homaj rajtoj aŭ eĉ akuzas ilin pro ilia rompado.

La homaj rajtoj estos respektataj nur kiam ĉiujn homojn oni traktos egalaj, senkonsidere pri ilia posedaĵo, socia stato, haŭtkoloro, religio kaj aliaj diferencoj, kaj kiam dum la konsumado de tiaj rajtoj oni ne damaĝas rajtojn de aliaj homoj. Kiel juristo kriminalisto, mi havis okazojn en institutoj de la jura medicino vidi la homan sangon kaj diversajn homajn organojn de diversaj rasoj kaj nacioj. Ĉe ĉiuj la sango estas ruĝkolora, kaj organoj kiel koro, cerbo, hepato, pulmo ne havas iun ajnan diferencon. Kial do permesi al stupidaj ekstremuloj konvinki nin ke ni estas diversaj. Nelson Mandela dum 28 jaroj estis en malliberejo, kaj elirinte ĝin, li pardonis al tiuj kiuj lin persekutis, li pacigis la persekutintojn kaj persekutitojn. Tiel li pruvis ke amo estas pli forta ol malamo. Ni memoru tion kaj daŭrigu lian faron.

Tre signifa por la funkciado de la homaj rajtoj estas ekkono kaj elimino de faktoroj kiuj ilin ĝenas kaj rompas (militaj agresoj kaj okupoj de suverenaj ŝtatoj, violenta altrudo de sia politika sistemo, kruda ekspluato de iliaj naturaj riĉecoj kaj iliaj laboristoj, malpurigado de la vivmedio...). Nur per la kreado de unu monda ŝtato la homaj rajtoj ekestos universalaj. La nova monda ŝtato respektos kulturajn kaj aliajn diferencojn inter la diversaj popoloj, regionoj kaj same respektos iliajn specifajojn; ĉio ĉi ilin proksimigos kaj kreos unu tute novan komunan kulturon. Estos malebligataj militaj intervenoj kaj okupoj de la membroŝtatoj de la monda federacio, ankaŭ la ekspluato de iliaj naturaj riĉecoj kaj laboraj resursoj; estos ebligata egalmezura evoluo de ĉiuj mondaj regionoj, obeo al la leĝoj, respekto de personeco kaj de ĝiaj ecoj...

IX

«Se Dio ne ekzistas, oni lin devus elpensi»

Voltaire

Kvankam pli ol 10% de la mondloĝantaro ne praktikas ajnan religion, ĝi restas gravega por pluraj loĝantoj de nia planedo. Plimulto da kredantoj estas toleremaj al aliaj religioj, kaj tiu toleremo plifortiĝas dum kontaktoj kun personoj devenantaj de aliaj landoj kaj kontinentoj. Bedaŭrinde, kvankam principe ĉiuj religioj predikas pacon, toleremon kaj kompatemon, certaj fanatikuloj kaj iliaj grupoj manipulas per siaj religioj, donante al ili interpretojn au signifojn kiuj ne estas en la akordo kun ties de la teologoj kaj pastroj. Ekzistas “memnomitaj pastroj” kiuj ekflamigas la malamon, kaj tiuj kiuj estis influataj de ili mortigas senkulpajn homojn “je la nomo de Dio”, aŭ devigas ilin ŝanĝi la konfesion, perforte devigas ilin edzi(ni)ĝi al tiuj kiujn ilia koro ne elektis, submetas ilin al sklaveco, ktp.). Pro la timo kaj ankaŭ pro aliaj kialoj, veraj pastroj ne sukcesas prudentigi la fanatikulojn, eĉ en la landoj kie certaj religioj estas laŭkonstitucie ŝtataj. Tia ĉi situacio inspiris kelkajn grupojn proponi la kreadon de “Unuiĝintaj Nacioj de Religioj”, la organizon kiu haltigos milojn da movadoj kiuj je la nomo de Dio mortigas homojn.

La nova monda ŝtato dediĉos apartan atenton al ĉiuj religioj. En ĝi nek ekzistos “ŝtata” religio, nek ĝi favoros unu inter ili, sed ĉiuj estos egalrajtaj. Ĉiu homo havos liberon elekti sian religion, esti ateisto, aŭ praktiki plurajn religiojn. La federacia ŝtato kreos kondiĉojn por ke religioj respektu unu la aliajn, interŝanĝu spertojn kaj kulturajn atingaĵojn. Kompetentulo el Ministerio pri religioj okazigos plurajn kunsidojn kun reprezentantoj de pli grandaj religioj kaj almenaŭ unufoje jare li devus organizi konferencon de la religiaj reprezentantoj.

Ĉar religioj estas ligitaj al la civitanoj, la federacia ŝtato enkondukos en la elementajn lernejojn devigon instrui gelnantojn pri la fundamentaj elementoj de pli grandaj religioj. Ĝi ankaŭ fondos universitatojn por pastroj. Enkadre de la studoj, estontaj pastroj lernos ne nur pri historio kaj specifo de sia religio, sed ankaŭ de aliaj; same ili lernos pri la politika sistemo de la federacia ŝtato, de la membroŝtatoj kaj ankaŭ pri aliaj gravaj soci-ekonomiaj aspektoj ligitaj al la civitanoj. Funkcion de la pastroj povas plenumi nur personoj kiuj finis tiujn ĉi studojn kaj ricevis la aprobon de la kompetenta ministerio. Per tio, la religioj alproksimiĝos, estos pli toleremaj unu al la aliaj, al civitanoj kaj al aŭtoritatoj kaj tiamaniere kreiĝos pli favora atmosfero por ĉiuj. En tiaj kondiĉoj iun tagon la kredantoj povos senprobleme partopreni diservon foje en preĝejo, foje en moskeo, foje en templo aŭ en iu alia dia domo.

X

*„Monda federacio estas klopodo
por ebligo de pli bona estonto»*

Willy Brandt

Sociaj asekuroj estas granda problemo de multaj hodiaŭaj suverenaj ŝtatoj. Malgraŭ ke ekzistas pluraj konvencioj kaj rekomendoj fare de Internacia Labora Organizo (ILO) kiu aktivas sub la gvido de Organizo de Unuiĝintaj Nacioj (UN), la sociaj asekuroj ne ekzistas en ĉiuj membroj de tiu ĉi organizaĵo. La sociaj asekuroj estas sufiĉe neevoluitaj ne nur en malriĉaj, sed ankaŭ en kelkaj plej riĉaj landoj (ekzemple en Usono). Agentejo de UN kiu aktivas en la kampo de sanprotekto, Monda Organizo pri Sano (*Organisation mondiale de la santé, OMS*) faras multajn klopodojn sed ne estas en la pozicio ebligi la kuracadon de ĉiuj mondaj loĝantoj.

La nova monda ŝtato dediĉos apartan atenton al la problemo de la sociaj asekuroj. La tuta loĝantaro de la estonta monda ŝtato estos asekurita kontraŭ malsanoj, invalideco, senlaboreco kaj malsato ; ĉiuj havos pensiojn, rajton al la vivminimumo kiu ebligas normalan vivon... Dungitoj kaj labordonantoj pagos la duonon de la difinita kotizo, sed personoj kiuj ne havas eblecon pagi, la pagon por ili transprenos la ŝtato.

Per reguloj bazitaj sur la konvencioj kaj rekomendoj de MOS (Monda Organizo por Sano), la nova monda ŝtato starigos solidarecon en la kampo de sociaj asekuroj en kiuj la kotizon oni pagos laŭ ekonomia povo de asekuritoj. Komence, la riĉaj pagos pli ol la malriĉaj, sed pli poste la soci-ekonomia stato de la malriĉaj pliboniĝos kaj ili kapablos pagi por si mem kaj ankaŭ por la aliaj. La hodiaŭaj organizaĵoj aktivaj en la monda nivelo (ILO, MOS kaj aliaj) daŭrigos siajn aktivadojn sub la gvido de la monda ŝtato.

XI

«Nacia suvereneco fariĝis

malkongrua kun la destino de la homaro. La nura alternativo estas monda registaro; sen ĝi sekvas la morto»

Bertrand Russel

Edukado estas ankaŭ unu el la neplenumitaj taskoj de la nuntempaj suverenaj ŝtatoj. Granda nombro de analfabetoj, manko de lernejoj kaj limigita aliro al edukeblecoj tion klare montras. Dum la malriĉaj landoj ne kapablas ebligi edukadon kaj malanalfabetigon al sia loĝantaro, la riĉaj landoj ne ebligas al *ĉiuj* siaj civitanoj egalan aliron al la alta edukado. Insisto al la soci-ekonomia stato de studentoj damaĝas la tutajn socion kaj ekonomion ĉar milionoj da talentuloj ne sukcesas ricevi diplomon de altlernejaj institucioj, kaj tiameniere ne sukcesas kontribui al ekonomio, scienco, sanprotekto...

La monda federacio entreprenos la paŝojn por ke la tuta loĝantaro de nia planedo ellernu legi kaj skribi. Elementa edukado estos deviga por ĉiuj junuloj malgrau ilia genro, socia stato, raso, konfeso kaj aliaĵoj. Ĝi estos senpaga. La monda ŝtato al ĉiuj ebligos ankaŭ la mezlernejan kaj altlernejan edukojn konforme al iliaj intelektaj kapabloj. Al talentaj studentoj kaj diplomitoj oni ebligos daŭrigon de postdiplomaj studoj en la universitatoj kaj sciencaj institucioj.

La programakcepto de lernejoj (lernejoj, universitatoj, institucioj...) estos en la kompetenteco de la federacia ŝtato ĝuste pro la kvalitegaliĝo de la eduko, kvankam tio ne ekskludos la ekziston de specialigitaj edukaj institucioj (specialaj lernejoj por elementa eduko de infanoj kun sanproblemoj, specialaj alternejaj institucioj...). En difinitaj kazoj, la federacia ŝtato permesos la ekziston de privataj lernejoj sed ili devos kontentigi minimumon de leĝaj kondiĉoj por ricevi la aprobon de la koncerna ministerio.

XII

„La mondo unuiĝos aŭ malaperos”

Albert Einstein

La kreado de la monda ŝtato devus havi transiran periodon en kiu formiĝos ĝia kerno, komence el kelkaj nuntempaj suverenaj ŝtatoj, kaj poste aliĝos ankaŭ aliaj ŝtatoj. Per sia organizado kaj aktivado (sen nukleaj armiloj kaj aliaj armiloj por amasa detruado) praktikante la egalecon de fizikaj kaj juraj personoj, zorgante pri siaj civitanoj kaj ebligante ili pli belan vivon, ĝi estos bona ekzemplo de la zorgema ŝtato.

En diktatoraj ŝtatoj, en kiuj oni ne protektas elementajn rajtojn kaj liberecojn de la civitanoj, en kiuj oni praktikas neegalecon de kompanioj, bankoj kaj aliaj institucioj, popoloj batalos por ŝanĝoj kaj postulos reformojn konforme al la monda federacio. La registaroj de tiaj ŝtatoj devintus reformiĝi, ĉar la nova federacia ŝtato ne kunlaboros kun ŝtatoj kiuj terorizas siajn civitanojn, praktikas korupton kaj favoritismojn kaj faras aliaĵojn neakcepteblajn por la monda ŝtato.

Komprenante la avantaĝojn de la monda ŝtato, la ŝtatanoj de landoj ekster la monda ŝtato luktos pli intense por siaj sociaj kaj ekonomiaj rajtoj, personaj liberecoj kaj por aliaj demokratiaj

valoroj, por forigo de neegalecoj, diktaturoj, militoj, violentoj, ekspluatoj, malsatoj kaj malsanoj. Ili do postulos rajton havi ĉion ĉi realigite.

Popoloj, kompanioj kaj aliaj institucioj kiuj ne havas atomajn armilojn kaj kiuj praktikas demokration, per kunlaboro kun la monda ŝtato ekvidos la avantaĝojn de sia aliĝo al la monda federacio kaj ili postulos referendumon por eniri ĝin. Tiel en la mondo iun tagon ekzistos unu federacia ŝtato kiu konsistos el ĉiuj nuntempaj suverenaj ŝtatoj, membroj de UN kaj ankaŭ tiuj kiuj ne estas membroj de UN.
